

**LASU KE AMBAŬ KUNE KRESKU ĜIS LA TAGO DE LA RIKOLTO /
Komento Evangelio de p. Alberto Maggi OSM**

El Evangelio laŭ Mateo 13,24-43

En tiu tempo Jesuo proponis al la homamaso ĉi tiun parabolon:

“La regno de la ĉielo similas al bona semo, kiun iu dissemis en sia kampo. Sed nokte, dum ĉiuj dormis, iu malamiko de la estro venis, semis malbonan herbon meze de la tritiko, kaj foriris. Kiam la tritiko kreskis kaj aperis ĝiaj spikoj, aperis ankaŭ la herbaĉo. Tiam la servistoj diris al la domomastro: ‚Sinjoro, ĉu vi ne semis bonan semon en via kampo? De kie venis do la herbaĉo?‘ Li respondis: ‚Iu malamiko faris tion.‘ Diris al li la servistoj: ‚Ĉu vi volas, ke ni iru ŝiri ĝin?‘ Sed la estro respondis: ‚Ne, por ke, elŝirante la malbonan herbon, vi hazarde ne elradikigu ankaŭ la tritikon. Lasu ke ambaŭ kune kresku ĝis la tago de la rikolto. Tiam mi diros al la rikoltistoj: Kolektu unue la malbonan herbon kaj ligu ĝin laŭ faskoj por bruligi ĝin; sed la tritikon kolektu en mian grenejon”.

Alian parabolon Jesuo proponis al ili: “La regno de la ĉielo similas al sinapa semero, kiun iu prenis kaj semis en sia kampo. Ĝi estas la plej malgranda el ĉiuj semoj, sed kreskinte, ĝi fariĝas pli granda ol la aliaj legomoj, kaj fariĝas arbo, tiel ke la birdoj de la ĉielo nestas inter ĝiaj branĉoj”.

Alian parabolon Jesuo diris al ili: “La regno de la ĉielo similas al iom da fermentaĵo, kiun virino prenis kaj miksis kun granda kvanto da faruno; kaj iumomente ĉi tiu estis entute fermentita

Ĉion ĉi tion Jesuo rakontis al la popolo per paraboloj, kaj sen paraboloj Li ne parolis al ili. Tiel efektiviĝis tio, kion diris la profeto:

“Mi parolos al ili per paraboloj,

Mi rivelos aferojn kaŝitajn

ekde la komenco de la mondo”.

Poste Jesuo forlasis la homamason kaj eniris en la domon. Tiam liaj disĉiploj alproksimiĝis al Li kaj diris: “Klarigu al ni la parabolon pri la malbona herbo kreskinta en la kampo”. Jesuo respondis: “Tiu, kiu semas la bonan semon, estas la Filo de la homo; la kampo estas la mondo; la bonaj semoj estas tiuj, kiuj apartenas al la dia regno; la malbona herbo reprezentas tiujn, kiuj apartenas al la diablo. La malamiko, kiu semis ĝin, estas la diablo mem. La tago de la rikolto estas la fino de la mondo, kaj la rikoltistoj estas la anĝeloj. Kiel do la malbona herbo estas kolektata kaj bruligata per fajro, tiel estos je la fino de la mondo. La Filo de la homo sendos siajn anĝelojn, kaj ili kolektos el lia regno ĉiujn faligilojn kaj ĉiujn, kiuj faras maljustecon, kaj ĵetos ilin en la fajran fornon. Tie estos plorado kaj grincado de dentoj. Tiam la justuloj brilos kiel suno en la regno de sia Patro. Kiu havas orelojn, klopodu kompreni!”.

Jesuo proponas al siaj disĉiploj tri parabolojn kiuj rilatas la tri grandajn tentojn de la komunumo:

- la tento esti komunumo de elektitoj
- la tento de la grandiozeco
- la tento de la malkuraĝiĝo

Por tiuj ĉi paraboloj Jesuo prenas tri elementojn de la naturo, la tritikon, la sinapon kaj la fermentaĵon, kiuj postulas paciencon kresko-procezon; ĉiu rapidigo povas esti pereiga. Tiuj paraboloj utilas por kompreni kio estas la regno de la ĉielo. Tiu tipa dirmaniero de Mateo ne celas la regnon en la ĉielo, sed la regnon de Dio, tio estas la alternativon de socio kiun Jesuo venis proponadi.

La unua parabolo parolas pri homo kiu semadis bonan semon, sed nokte la malamiko semadas lolon. Lolo estas planto kies grajnoj estas toksaj

kaj havas narkotan efikon. Nu, la servistoj miras ke sur la kampo de la mastro estas lolo kaj ili pridubas la bonecon de lia semado kaj demandas al li: *“ĉu vi ne semis bonan semon?”*. Kaj la mastro respondas: *“Iu malamiko faris tion!”*

Kaj jen tuj la zorgemo de la servistoj: *“Ĉu vi volas, ke ni iru ŝiri ĝin?”*. Ilia agado riskas esti pli danĝera ol la lolo. La fervoro de la servistoj estas pli danĝera ol la damaĝo kiun la lolo povas kaŭzi. Kaj la homo respondas: *“Ne, por ke, elŝirante la malbonan herbon, vi hazarde ne elradikigu ankaŭ la tritikon”*.

Venos poste la momento de maturiĝo kaj tiam estos malkaŝa tio kio estas tritiko, kiu donas la vivon, kaj tio kio estas lolo, kiu male estas toksa kaj donas la morton.

En la dua parabolo Jesuo distanciĝas de la grandioza bildo de la regno kiu estis priskribita de profeto Ezekielo en ĉapitro 17 de lia libro. La profeto bildigis altegan monton kaj sur tiu altega monto iun cedron. Cedro estas la plej bela planto, la plej bela arbo, nomata *“la reĝo de la arboj”*, io do kiu eĉ de malproksime altiras la atenton.

Nu, Jesuo distanciĝas de ĉio tio, *“La regno de la ĉielo similas al sinapa semero”*, kiu estas la plej eta elemento, preskaŭ mikroskopa *“kiun homo semis en sia kampo. Ĝi estas la plej malgranda el ĉiuj semoj, sed kreskinte, ĝi fariĝas pli granda ol la aliaj legomoj”*. Atentu tiun detalon. Ĝi ne estas planto kiu kreskas sur la montosupro, sed en la hejma legomĝardeno. La sinapa arbusto – ĉar eĉ ne eblas paroli pri arbo – ankaŭ en la momento de la maksimuma evoluo atingas du metrojn kaj duonon, maksimume tri.

Ĝi estas ordinara planto kiu ne altiras atenton. La regno de Dio, ankaŭ en la momento de ĝia maksimuma evoluo, ne altiros la atenton de la homoj pro ĝia grandiozeco, pro ĝia beleco. Sed, ĉar tiuj semoj estas tre malgrandaj, la vento ilin portas ĉien kaj ĝi estas trud-planto.

Fine la tria parabolo, kiu rilatas la regnon, diras: *“La regno de la ĉielo similas al iom da fermentaĵo, kiun virino prenis kaj miksis kun granda kvanto da faruno; kaj iumomente ĉi tiu estis entute fermentinta”*. Kial la evangeliisto utiligas tiun mezurunuon? Tri farununuoj estas ĉirkaŭ 40 kg, kaj tiu unuo retroveblas en tri epizodoj de la Malnova Testamento kiuj rilatas la realigon de tio kio estis taksata nebla. Ĝi estas tio kion proponas Abrahamo kaj Sara kiam estas al ili anoncote ke ili havos filon malgraŭ la maljuna aĝo.

Ĝi estas la sama de Gideono, kiu sentas sin forlasita de Dio kaj kredas ke la liberigpromesoj de la Sinjoro jam ne plu estas realigeblaj, kaj estas tiu de Anna, la patrino de profeto Samuelo kiu estis sterila kaj tamen naskos infanon. Temas do pri situacioj en kiuj tio kio ŝajnis nebla iĝas realaĵo. Jesuo do certigas ke la forto de lia mesaĝo estas tioma ke ĝi kapablos fermentigi la tutan mondon.

Tri paraboloj, la ununura pri kiu la disĉiploj petas klarigojn estas tiu de la lolo, sed ne ĉar ili ne ĝin komprenis; ĝuste ĉar ili ĝin komprenis ili ne konsentas. Ili plenas je sentoj de supereco, ambicio, rivaleco inter si, kaj do ne konsentas pri tiu fakto ne esti komunumo de justuloj, komunumo de elektitoj. Ili alproksimiĝas al Jesuo kaj, imperativece, diras al li: "*Klarigu al ni la parolon pri la malbona herbo kreskinta en la kampo.*"

La voĉtono do estas de tiu kiu ne konsentas. Kaj Jesuo klarigas: "*Tiu, kiu semas la bonan semon, estas la Filo de la homo*". Filo de la Homo indikas Jesuon en la dia kondiĉo, "*la kampo estas la mondo; la bonaj semoj estas tiuj, kiuj apartenas al la dia regno*". Filoj de la Regno estas tiuj kiuj akceptis la kondiĉojn por ke la regno iĝu reala. Kaj la kondiĉo por ke la regno iĝu reala estas la konvertiĝo, la anstataŭigo de falsaj valoroj kiuj regas la socion, por akcepti la novajn proponatajn de Jesuo, tio estas la kundivido, la servado kaj la universala amo.

"*La malbona herbo estas la filoj de la Diablo*", per la vorto "filo" oni indikas tiu kiu similas al la patro, kaj tiun malamikon Jesuo trovas en la diablo, kiu estas la povo, la rego, la ŝajno. "*La tago de la rikolto estas la fino de tiu epoko*", ne la fino de la mondo, "*kaj la rikoltistoj estas la anĝeloj*", tio estas la senditoj de la Sinjoro.

Kaj Jesuo klarigante aldonas: "*Kiel do la malbona herbo - tio kio estas toksa - estas kolektata kaj bruligata per fajro, tiel estos je la fino de la mondo. La Filo de la homo sendos siajn anĝelojn, kaj ili kolektos el lia regno ĉiujn faligilojn*". La esprimo "skandalo"(= faligilo) oftas en la kolizio inter Jesuo kaj Petro, kiam Jesuo diros al li: "Malproksimiĝu de mi, vi kiu estas skandalo-kaŭzo". La skandalo ŝuldiĝas al la ideo de iu triumfanta mesio, de iu sukcesa mesio, kiu ne estos tiu kiu manifestiĝos en Jesuo.

Li do ĉi tie referencas al ĉiuj tiuj kiuj volas la triumfon, "*kaj ĉiujn, kiuj faras maljustecon*". La esprimo aperis por tiuj disĉiploj kiuj estas konstruantoj de l' nenio, estis dirinta Jesuo, ĉar ili anoncidas la mesaĝon, sed ne kiel esprimo de ilia vivo, sed kiel utiligo de la nomo de la Sinjoro. Ili konvertadas la aliajn, sed ne konvertiĝis mem. Tiujn Jesuo konsideras kiel tiujn kiuj faras maljustaĵojn, tio estas tiuj kiuj konstruas sur la nenio.

Kaj ĉi tie Jesuo prunteprenas la bildon de profeto Danielo kaj diras "*kaj ĵetos ilin en la fajran fornaron*", kio signifas la kompletan detruon, simbolon de morto. "*Tie estos plorado kaj grincado de dentoj*". Tiu estas bildo kiu reprezentas la senesperon pro la fiaskado. En la itala lingvo oni povas uzi la esprimon "*forĝiri siajn harojn*", kiu havas la saman signifon, signon de senesperigo kaj de fiaskado.

Tiam, ĉiam uzante esprimojn de la libro de Danielo, "*tiam la justuloj brilos kiel suno en la regno de sia Patro*" Tiu kiu elektas la vivon havos la vivon. Tio estas la signifo de tiu ĉi parabolo: kiu produktas la vivon eniras en la plenecon de la vivo, kiu estas mortinta kaj produktis morton tiu dronos en la plenecon de la morto.